

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2017

Jarkolekto 4 - Numero 2



Filatelica e Numismatica ENAL

ENHAVOTABELO

de aprilo 2017

Titolpaĝo	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni	3
Moneroj & medaloj	4
<i>Duobla Esperanto-jubileo en 2007</i>	
<i>Portugaliao 1987</i>	
<i>Plaketo Bielsko-Biala 1978</i>	
<i>Hispanio 1969</i>	
Spikumaĵoj kaj suplementoj: Premio-kuponoj: la originala kupono	10
Por spuremuloj!	11
Medalistoj: 8. Serge Santucci (°1944 -)	12
Aspektoj de numismatiko: Kolekti kaj ordigi medalojn (2)	13
Historiaj aspektoj:	
Epilogo pri eksperimentoj celintaj stabilan valutsistemon (4)	15
Terminaro: alfabeto listo (9)	17
El la gazetaro	18
Retpoŝto	20
Anoncoj & eventoj	37

Tajpado & paĝaranĝo: Vivienne Tutds

bert.boon@skynet.be

Provlegado: Jozefo Horvath

www.esperanto.es/biblioteko

Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!

www.kolektado.esperanto.cc

Finredaktoro: Bert Boon

DE NI POR ... NI!

Tri monatoj pasis post la dissendo de la unua numero de la 4a jarkolekto. La reagoj de kelkdekoj el vi, krome de novaj membroj, montras la ŝaton kaj aprezon de la temoj kaj de la amplekso de la rubrikoj de nia revuo. Krome rapide kreskis denove la nombro de membroj el diversaj landoj kaj kontinentoj **ĝis 77!** La novaj membroj devenas el Aŭstrio (2), Belgio (3), Ĉeĥio (1), Ĉinio (1), Dominika Respubliko (1), Germanio (1), Islando (1), Italio (1), Kubo (1), Nederlando (1) kaj Rumanio (1).

64	Doru Neagu	RU	02,02,2017
65	Walter Klag	AT	09,02,2017
66	Alfred Heiligenbrunner	AT	09,02,2017
67	Trezoro	CN	27,02,2017
68	Yvo De Craemere	B	27,02,2017
69	Bert Gardien	NL	04,03,2017
70	Jacques Priem	B	12,03,2017
71	Patrick Pasmans	B	12,03,2017
72	Bruno Knapstein	D	16,03,2017
73	Jón Elíasson	IS	18,03,2017
74	Antonio De Salvo	I	21,03,2017
75	Yoandris Pompa Valdespino	CU	23,03,2017
76	Rafael Despradel	DO	24,03,2017
77	Petr Deák	CZ	08,04,2017

Entuziasmiga novaĵo en 2016 estis, ke la L(oka) K(ongresa) K(omitato) de Seulo (Korea Respubliko), kiu organizas la ĉi-jaran Universalan Kongreson, decidis emisii porokazan medalon, pri kies kvanto oni decidis en 2017.

Krome, freŝa mesaĝo de nia membro d-ro Walter Klag el Aŭstrio anoncas, ke en 2017 laŭ lia iniciativo estos eldonita esperanta medalo por rememorigi la centjaran datrevenon ĉi-jare de la forpaso de L.L. Zamenhof. Legu tiurilate la tre interesan artikolon en la ĉi-numera rubriko “*El la Gazetaro*”. Ni ĝustatempe informos vin ĉiujn, porke tiuj, kiuj emus havigi al si unu aŭ ambaŭ novajn medalojn, povu mendi ilin ĉe sinjoroj Klag aŭ Kang. Dume Walter Klag anoncis sin kiel 2a fakdelegito pri numismatiko en la Jarlibro de UEA. Korajn gratulojn!

En ĉi numero vi retrovos evidente la kutimajn kaj konatajn rubrikojn. En la ĉefa rubriko vi trovos priskribojn kaj bildojn de altkvalitaj numismatikaĵoj el Israelo, Portugalio, Pollando kaj Hispanio. Enigma numismatikaĵo kaŭzos al vi sendormajn nokojn, se vi almenaŭ estas vera spuremulo!

Fama franca artisto-medalisto el Parizo estas al vi prezentata kiel kreinto de multaj altnivelaj medaloj, el kiuj du estas esperantaj. La enhavon de la aliaj rubrikoj vi prefere malkovru mem!

Pro la (tro) kreskanta amaso da retmesaĝoj de novaj membroj, ni ne plu reproduktos tiajn mesaĝojn kun respondoj. Tamen ni senĉese raportados pri novaj membroj en ĉi rubriko. Tamen ni daŭrigos la reprodukon de ĉiuj aliaj mesaĝoj koncerne (esperantan) numismatikon.

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo A 1- Esperanto-medaloj

Duobla Esperanto-jubileo en 2007



Lando: Israelo	Kvanto: oraj: 120
Metalo: oro, arĝento, bronzo	arĝentaj: 360
Jaro: 2007	bronzaj: ankoraŭ ne fiksita
Pezo: ora: 17 g	Diametro: ora: 30,5 mm
arĝenta: 31,1 g	arĝenta: 39 mm
bronza: 276 g	bronza: 76,2 mm
Medalisto: averso: Ruben Nutels	
reverso: Aharon Shevo	

Averso:

Busto de Zamentof (sur la bronza kaj la arĝenta: verda steleto kiel insigno sur la roverso de LLZ). Surskribo en la hebrea; sub ĝi la signaturo de Zamenhof.

Reverso:



Meze finkonstruita babela turo, konsistanta el literoj kaj hieroglifoj de diversaj alfabetoj. Pinte la nova, jubilea simbolo (ekde 1987). Ĉirkaŭe maldekstre, ekster la horizontala ovalo: - UNU LINGVO KAJ UNU PAROLMANIERO - . Ĉirkaŭe dekstre: sama (?) surskribo en la hebrea. Tute sube: ESPERANTO. Dekstre kaj maldekstre de ĝi 3 figuroj kun fronta silueto, en la mezo virino, flankata de 2 viroj, ĉiuj manenmane irantaj en la sama direkto.

Rando:

STATE OF ISRAEL יִשְׂרָאֵל sama (?) skribo en la hebrea – SILVER 999 (nombro ankaŭ en la hebrea)

Rimarko 1:

La ora konsistas el 14 karatoj da oro, la arĝenta el pura arĝento (°999). Ambaŭ la arĝenta kaj la bronza posedas koloran steleton.

Rimarko 2:

La “riparita” babela turo estu la nuntempa simbolo de komuniko, paco kaj frateco.

Rimarko 3:

La jarciferoj 1887-2007 simbolas la 120 jaran jubileon de Esperanto kaj la 90-jaran datrevenon de la forpaso de Zamenhof.



La israela medalo estas la nura al ni konata kiu montras la babelan turon, tamen ofta simbolo en multaj esparantaj verkoj. Aldone ni montras la nuran (?) esperantan poŝtmarkon- oficialan belgan poŝtmarkon el 1982- kun klasikstila bildo de la sama turo, laŭ la pentraĵo de la famega pentristo flandra (belga) Petro Bruegel la Maljuna (1525- 1569).

Kun kora danko al s-ino Joske Huysmans, kiu sukcese preparis la bildojn de la medaloj!

Tipo A 1 – Esperanto-medaloj

PORTUGALIO 1987



Lando: Portugalio

Kvanto: 1000

Metalo: bronzo

Pezo: 210 g

Diametro: 78,5 mm

Medalisto: L. Ramos de Abreu

Jaro: 1987

Diko: 6 mm

Averso:

granda stiligita stelo meze, kun jubilea emblemo kaj ĉirkaŭa skribo:

CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO * 1887 – 1987 *

Reverso:

busto de Zamenhof kaj ĉirkaŭa skribo:

KREINTO DE LINGVO INTERNACIA * L.L.ZAMENHOF *

Rando:

247/1000 – GRAVARTE · LISBOA · PORTUGAL -

Rimarko 1:


* = eta sespetala “floreto”

Rimarko 2:

memore al la centjara jubileo de Esperanto 1987, la kooperativo “SALUTON” en Cacem mendis medalon ĉe entrepreno Gravarte.

Tipo D 1 –Unuflankaj Esperanto-medaloj

Plaketo Bielsko – Biała 1978



Lando: Pollando

Metalo: bronzo (sur blanka kartono)

Mezuroj: kartono: 147 mm x 105 mm

plaketo: 99 mm x 59 mm

Eldonkvanto: 50 – 60

Pezo: 10g

Artisto: iu klubanino projektis ĝin

Jaro: 1978

Averso:

maldika, reliefa plaketo kun plialtigitaj partoj.

Supre: cirklo kun stiligita kombino de du ŝildoj de la urba blazono de la suda pola urbo Bielsko-Biała [elp. bjelsko-bjava].

Sube: kartuŝo pri la jubileo.



Eldonita okaze de la 20-jara ekzisto de la loka klubo. La aranĝo okazis en kulturdomo “Włókniarz”, (Feksosto) je la 13a de marto 1978 kun partopreno de urbaj instancoj.

Ni danke mencias nian ENA-anon Stanisław Mandrak, kiu sendis ege interesajn informojn.

Tipo A 1–Esperanto-medaloj

Hispanio 1969



Lando: Hispanio

Metalo: nekonata, eble latuno

1 kuprokolora surfaco

2 grizkolora surfaco

Diametro: 50 mm

Kvanto: nekonata

Pezo: 75 g

Medalisto: Pujol

Diko: 5 ĝis 7 mm (reliefo)

Jaro: 1969

Averso:

Zamenhofa busto kun jarciferoj 1859 1917.

Supre, duone ĉirkaŭata: INICIATORO DE ESPERANTO (1887)

Sube, duone ĉirkaŭata: DRO. L.L.ZAMENHOF

Apud la maldekstra ŝultro de Zamenhof: PUJOL

Reverso:

Centre – supre: steleto kun majuskla E. Sub ĝi surskribo:

H.E.F. STARIGIS UNUAFOJE EN HISPANIO FONDUSON “ESPERANTO” (1969)

Ĉirkaŭaj skriboj: SUB PREZIDO DE DRO. M. SANCHO IZQUIERDO

GEEDZOJ CASANOVAS-FERRANDIS, TESTAMENTIS HELPON AL GI

Rimarko:

H.E.F. = Hispana Esperanto-Federacio

SPIKUMAĴOJ KAJ SUPLEMENTOJ

Premio - kuponoj: la originala kupono



Nia tre aktiva Walter Klag atentigis nin pri la supra kupono kun la jarindiko "Valida ĝis la fino de 1950". Tia ekzemplero estas raraĵo, kiu kostas nuntempe pli ol 50 eŭrojn!



En numero 2 de jarkolekto 3, sur paĝo 13, troviĝas bildoj kaj klarigo pri la prilongigitaj ekzempleroj, respektive de la jaroj 1965 kaj 1975.



Jen la listo de la jaroj kaj koloroj de la surstampoj.

ĝis 1950:	ruĝa	ĝis 1975:	verda
ĝis 1955:	violeta	ĝis 1980:	violeta
ĝis 1965:	violeta	ĝis 1985:	ruĝa

En niaj arkivoj do mankas bildoj de 1955, 1980 kaj 1985. Ni estus kontentaj pro via helpo. DANKON!

POR SPUREMULOJ!

En la datumaro de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni ĝis hodiaŭ scias preskaŭ nenion.

Tial ni kreis tute novan rubrikon "POR SPUREMULOJ". Multaj kapoj scias pli ol nur unu kaj multaj okuloj vidas kaj legas pli ol nur unu okulparo. Do ni petas vin atenti kaj dise rigardi, eĉ demandi kaj spuri, kiel kutimis Hercule Poirot aŭ Sherlock Holmes...

Eternaj omaĝo kaj famo estos via rekompenco! Ni anticipe dankas vin ĉiujn!

3a enigmo

Hungara (?) insigno por Esperantistoj- merituloj



MEDALISTOJ

8. Serge Santucci (°1944 -)



Serge SANTUCCI (elp.santuĉi) naskiĝis en 1944 en la sudo de Francio. Li estas skulptisto kaj medalisto, lerninto de Raymond Corbi, profesoro pri skulptado kaj gravurado de medaloj ĉe la Nacia Supera Lernejo pri Belartoj en Parizo. En 1971 li ricevis la "grandan premion" pri arta skulptado ĉe Casa de Velasquez en Madrido .

Li kreas medalojn laŭ tekniko de rekta ĉizado, la plej malfacila metodo. La listo de liaj medaloj kombinas honorigon de famuloj, (ekz.Rabelais, Goya,Rubens, Van Gogh,Velasquez,Frédéric kaj Irène Joliot-Curie, d-ro Zamenhof...) kaj datrevenon de famaj eventoj(ekz. la 40-jariĝo de alvoko de Charles de Gaulle la 18an de junio 1940; la 400-jariĝo de la naskiĝo de Raphael...).



Superba neesperanta bronza medalskulpturo el la Monfarejo de Parizo. Diametro: 110 mm. Pezo: 700 g.Averso: kapo de Kristoforo Kolumbo. Konkava flanko por emfazi la pufiĝon de la ŝipveloj. Reverso: emajla kartuŝo, en kiu estas uzataj 4 koloroj kaj orpapero. Ĉiu ekzemplero estis permane patinigita laŭ sekreta tekniko de la artisto kaj unuope numerita.



ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Kolekti kaj ordigi medalojn (2)

2. Ordigi

2.1. Interrilatoj

Ordigi estas malkovri kaj montri interrilatojn. Igi ordon en kolekto eblas diversmaniere. Ekzemple alfabete laŭ la nomo de la medalisto aŭ laŭ temo (*Esperanto, Zamenhofaj medaloj, UK-medaloj, Esperanto-medaloj de unu nura medalisto...*).

Prefere oni ordigu laŭ strikta skemo, tamen sufiĉe elasta por ke oni povu facile regroupigi parton de la kolekto, evitante la bezonon denove registri ĉion. Rekomendindas informadika programo "Microsoft Access", kiu tiucele vere taŭgas.

2.2. Jen modela slipo:

- * *Nomo* de la medalo
- * *Komisio, medalisto kaj ateliero* (cetere uzita tekniko)
- * *Bildo*, reproduktaĵo de ambaŭ flankoj (kun eventuale inventarnumero de propra kolekto aŭ referenco al ekstera fonto)
- * *La forma priskribo*: averso (Av.), reverso (Rv.) kaj rando (Rd.)
- * *La enhava priskribo*: kaj aldone la historia kunteksto
- * *Bibliografio*: reference al aferkoncerna skribita informo pri la medalo

2.3.1. Komisio kaj komisiinto

Menciu la komisiintan instancon aŭ personon kaj, se eble, la instigan okazaĵon aŭ eventon. Pro la evoluo de medalarto al aŭtonoma arto, ankaŭ medaloj povas esti la rezulto de la krea povo de artisto, sen ajna alia celo aŭ motivo.

2.3.2. Medalisto(j)

Menciu la artiston-gravuriston (se eble naskiĝdaton kaj mortodaton), kiu skizis la medalon. Eventuale la medaliston (realiginton), ofte la sama persono.

La econ de la originala artefakto (la modelo):

-laŭ vera formato, tranĉita en ŝtalo

- "en creux": per kavigo de ŝtalo: la matrico
- "en poinçon": per fortranĉo de ŝtalo por fari reliefon: la patrico

- laŭ pli granda formato, modlita en argilo, gipso, vakso aŭ eltranĉita en ligno

2.3.3. Ateliero

-Jaron kiam la medalo estis fabrikita kaj eldonita

-Fabrikado de la

- *patrico*: muldaĵo en araldito, reduktita per reduktilo. Post malmoliĝo de la turbita ŝtalo estiĝas la patrico.
- *matrico*: ekzistas du manieroj. En celata formato (france: “taille directe”): la medalo estas gravurata en la ŝtalon (spegulbilde) aŭ la reduktita patrico estas presata en molan ŝtalon, sekve malmoligata.

3. Fabrikado de medaloj

3.1. laŭ tekniko de muldado

La artisto skizas en celata formato en facile prilaboreblan materialon kiel gipso. La muldisto fabrikas la saman formon plurfoje kaj muldas ĝin en specialan sablon, kiu bonege montras la detalojn.

3.2. laŭ tekniko de stampado (pregado)

La artisto skizas en facile prilaboreblan materialon, kiel gipso, sed multe pligrandigitan ol la celata formato. Tiel li povas aldoni multajn detalojn.

La gipsa bildo iĝas negativa bildo en pli malmola materialo, kiel araldito. La negativa bildo estas reduktita per reduktilo. Dum 24 horoj la maŝino “tuŝas” la enaraldigitan bildon, “legas” la trajtojn kaj dume gravuras la bildon en celata formato en ŝtalan stampilon. Post provfrapo ĝi estas malmoligata en pli mola materialo. Por malmoligi oni unue varmigas la stampilon kaj sekve malvarmigas ĝin en oleo. Sekve la stampilo estas portata al la produktejo kaj metata en la medalpremilon. Inter la superan kaj la suban stampilon estas metata metala lameno (ekz. el arĝento) kaj la premilo stampas la medalon en la lameton.

Poste la medalo estas finlaborata. Eblas ankaŭ patinigi ĝin: por emfazo de la reliefo estas uzataj ocidoj. Eblas krome emajligi ĝin: emajpulvo surbaze de pistita vitro estas aldonata per spatelo kaj enbakata per brulilo. Fine, sed ne necese, la gravuristo povas gravuri personan dediĉon aŭ nomon.

3.3. laŭ latekniko de rekta gravuro

La plej malfacila, plej malnova tekniko estas la gravurado en ŝtalan stampilon, kiu poste estas malmoligata kaj uzata. (Vidu ankaŭ rubrikon “MEDALISTOJ”)



Laŭ tekniko de rekta gravuro



Gravurado en gipson

HISTORIAJ ASPEKTOJ

Epilogo pri eksperimentoj celintaj stabilan valutsistemon(4)

Por fini la artikolaron pri spesmila kaj stela valutaj konceptoj, ni donos la provizore lastan parolon al du eminentaj fakuloj. Unuavice al la nederlanda fakulo pri nederlanda kaj pri ĝenerala numismatiko, L.M.J. Boegheim, sekve al nia germana, honora membro kaj fakulo pri esperanta numismatiko, Hans Jankowski.

“La idealo de Universala Ligo estis, senĉese strebi al stabila aĉetpovo surbaze de la de ĝi lanĉita stelo. Ekde la emisio en 1946 de la 1stelo-kuponoj de Andreo Cseh ĝis la unua de januaro 1977 la stelo estis la financa ekvivalento de 1 kvarono de guldeno kaj simbolo de 1 kilogramo da pano. Tio ne vere estis serioza normo, ĉar tiel la stelo estis same kaduka kiel la naciaj valutoj. La kurzo jam delonge ne plu estis reala. Tial UL decidis duobligi la valoron kaj ordonis, ke ekde tiam la valoro estu stabila, kio tamen ne estis tre reala ordono. (...)

Malgraŭ la neperfekteco, sekve de multaj problemoj interligitaj kun la provoj daŭrigi la stabilecon, oni devas agnoski, ke la stelo koncerne aĉetpovon en la epoko 1977-1987 estis pli stabila ol iu ajn nacia valuto. Ĉiuj naciaj valutoj estis turmentataj pro terure rapida inflacio. Tio ne koncernis la stelon. La kurzon de la stelo, kompare al naciaj valutoj, ĉiujare publikigis ne nur la revuo de UL, sed ankaŭ la ĝenerala revuo “Esperanto”, organo de UEA. Tio ebligis al internaciaj organizacioj fiksi konstantajn prezojn kaj proklami fiksajn kotizojn en steloj. Dume, pagoj en ĉiu ajn valuto povus okazi je la tiamtaga kurzo. Bedaŭrinde, tiuj eblecoj apenaŭ estis uzataj, probable pro la “komplekseco”, aŭ ĉar oni preferis iun nefidindan nacian valuton al la “pridubita fidindeco” de la kurzo de “bagatela” organizacio kiel Universala Ligo.

La mezepokaj monunioj kaj la Latina Monunio en la 19a jarcento estis senescepte katastrofaj. La privata entrepreno de IEI estis ankaŭ malbenata. Ankaŭ la de EU celata monunio por la landoj de Eŭropa Unio sufiĉe certe estos damnita. Jam nun estas klare, ke inter severaj limoj valutaj kurzoj stabilaj ne povos esti firmtenataj. Tia falsa espero nur montras la supermezuran fremdiĝon de politikistoj koncerne la realan vivon.” (esperantigis B.B.)

L.M.J. Boegheim: “Esperanto-betaalpenningen”, MUNT-koerier, maart 1994, nr.3, p 27-33

“Dum kvar jarmiloj la homaro uzis monon, kiu havis ian realan valoron, kiel greno, bestoj aŭ metalpecoj. Antaŭ ducent jaroj papermono pli kaj pli anstataŭis la metalajn monerojn kaj nun, en la komenco de la 3a jarmilo de nia kalendaro, la papermonon forpuŝas kreditkartoj kaj monoĝiroj. Mono fariĝas fikcia kalkulunuo sen garantiata aĉetpovo.

Mono povas plenumi tri diferencajn funkciojn:

- 1 Ĝi servas por la interŝanĝo de varoj. Tiun taskon plenumas ankaŭ inflacia mono, kies aĉetpova valoro ĉiutage malpliĝas.
- 2 Mono estas valormezurilo por kompari la valoron de varoj okaze de interŝanĝo. Tiun kvaliton inflacia mono grandparte perdas.
- 3 Mono en si mem havas realan valoron kaj taŭgas por konservado kiel argĝentaj aŭ oraj moneroj, kiuj ne povas esti produktataj senlime.

Dum la pasintaj 50 jaroj eĉ la plej stabilaj valutoj perdis 75% de siaj aĉetpovaj valoroj en Svisio, Germanio kaj Nederlando kaj 90-95% en Britio, Francio kaj Usono.

La ideo de la Universala Ligo 1976 doni al la stelo valorstabilecon estis tre bona. Eraro estis fiksi tiun valoron al prezindekso en Amsterdamo, kiu ne havis komparon kun prezoj en najbaraj landoj kaj tute maltrafis komparon en malriĉaj landoj.

Restas la bezono de kompara valorunuoj tutmonda. Sed tia devas sin bazi sur tutaĵo de varoj, ĉiutage minimume bezonata de homo, kies valoro estas de ĉiu elkalkulebla. Manipulebla prezindekso farita de pagataj sciencistoj ne taŭgas por komparo.”

Hans Jankowski: “Esperanto-mono. Ilustrita historio pri universala monosistemo”, Kaunas-Litovio, 2000

Konciza bibliografio

“Internacia Scienca Revuo”: Projekto pri internacia mono (0.1907)

Pri internacia helpa mono (12. 1907)

René de Saussure: “La Monnaie Internationale” (1914)

Dr. Josef Hartl: “Der Weltspiegel” (01.1932)

“Enciklopedio de Esperanto” (1933)

“La Praktiko” (julio-aŭgusto 1960)

Dr. H.Unger: “Weltgeld und Weltbank: Das Experiment mit der ‘Esperanto-Währung’,

Freies Volk, Bern (August 1945)

TERMINARO

Alfabeta listo (9)

araldito: epoksirezino, karbona kombinaĵo, ĝenerale uzata por agregi du sekciojn.

matrico: gravurita metala peco aŭ muldilo, pere de kiu oni povas fabriki similajn pecojn per stampado aŭ fandado (medalojn, monerojn, aŭtoplatojn). Sinonimoj: formilo, formujo, muldilo.

moncirkulado: signifas ke homoj regule uzas monon emisiitan de la ŝtato.

perdiĝo de monvaloro: esprimo uzata en epokoj kiam valoro kaj aĉetpovo de mono malkreskas.

numismatika letero: konsistas unuflanke el koverto kun speciala poŝtmarko kun unuataga aŭ speciala stampo, aliflanke elspeciala monero aŭ medalo, aldonita en la koverto aŭ en numismatika folio, kaj rilatanta al la temo de la poŝtmarko.

patrici: stampi per patrico.

patrico: ŝtala peco, gravurita reliefo, uzata por fari matricojn por medaloj, moneroj, prestipoj kaj aliaj fandaĵoj.

ŝmirmono: koruptilo.

ŝtalo: tre malmola metalo, alojo de fero kun malpli ol 1,8% da karbono, jam forĝebla sen speciala traktado kaj povanta, per traktadoj mekanikaj aŭ termikaj, akiri tre diversajn ecojn.

straso: senvalora imitaĵo de oro, perloj, diamantoj ks; falsbrilaĵo.

zekino:

1 ormonero kun diversaj valoroj, uzita iam en Venecio kaj en mediteraneaj landoj.

2 moneroforma ornamaĵo, el arĝento aŭ straso, alkuditra al virina vesto.

Sinonimo: dukato.

Kelkaj esperantaj proverboj:

Nuda kaj kruda sen groŝo en poŝo.

El la poŝo al la buŝo.

Multe en kapo, sed nenio en poŝo.

Fremda spesmilo estas sen utilo.

Kiu speson ne tenas, tiu al spesmilo ne venas.

Spesmilo superflua poŝon ne ŝiras.

Interese

Esperanto-Mono

■ Walter Klag

René de Saussure naskiĝis la 17-an de marto 1868 en Ĝenevo. Lia frato Ferdinand, renoma lingvisto, ne volis viziti "malseriozan" Esperanto-kongreson kaj instigis René lerni tiun lingvon. Legante la kolofonon de Esperanto-gazeto, René rimarkis, ke la abonprezoj estas esprimitaj en diversaj valutoj. Li havis la ideon, ke pli facile estus uzi nur unu „neŭtralan“ monsystemon „Inter-Mono“ (IM). Se estas 10 valuto-kurzoj, oni devas ĉiutage elkalkuli dekoble $9 = 90$ kurzrilatojn. Uzante IM, oni bezonus nur dekoble $2 = 20$ kurzrilatojn.

1907 René publikigis sian projekton de universala monsystemo. Verŝajne el la franca vorto espèces (kontante pagi) li kreis la esprimon "Speso". Por eviti onojn li difinis: Unu Spesmilo (Sm) = 10 Spescentoj = 100 Spesdekoj = 1000 Spesoj. La valoro de unu Sm estis tiam la sama kiel 0,733 g da pura oro, hodiaŭ ĉirkaŭ 30 €. Ĉar kelkaj valutoj estis ligitaj al la oro, oni povis facile kalkuli: 1 Sm = 2 britaj ŝilingoj = 1 rusa rublo = 0,5 usonaj dolaroj = 2,5 svisaj kaj francaj frankoj = 2,5 hispanaj pesetoj. Kelkaj britaj kaj svisaj bankoj oficiale uzis la Sm.

La germano Herbert Höveler loĝis en Britio kaj fondis en la jaro 1907 la Ĉekbankon Esperantistan, kiu oficiale uzis la Sm. En 1914 la banko havis 730 kontoposedantojn en 320 urboj el 43 landoj. Post la morto de la fondinto en 1918 la banko likvidiĝis.

En 1927 aperis paperaj Spesmiloj. La nominalaj valoroj estis duona Sm: 2, 5 kaj 10 Sm. Laŭ la surskribo la falsado estis leĝe punota.

Ekzistas du arĝentaj Spesmilaj moneroj (Albert Boon diras: medaloj aŭ pagomedaloj).

Ili konsistas el arĝento (11/12) kaj kupro (1/12). La diametroj estas 30 aŭ respektive 36 mm.

Hodiaŭ la 1-Spasmila kaj precipe la 2-Spasmila monero estas tre maloftaj kaj multekostaj objektoj por kolektantoj. Unu monero kostas inter 100 kaj 500 €. Ekzistas nur unu ora monero de 50 spesmiloj, donacita en 1913 dum la Universala Kongreso en Krakovo al d-ro Zamenhof. Eble tiu monero perdiĝis.

En 1942, ankoraŭ dum la Dua Mondmilito, fondiĝis en Nederlando Universala Ligo (UL). Tiu monfederista organizaĵo estis malferma al ĉiuj, sendepende de la lingvo, tamen la oficiala lingvo estis Esperanto. La ĉefaj aktivuloj estis Julia Isbrücker (1887 – 1971), la vicprezidanto de UEA Johannes Rijk Gerardus Isbrücker (1889 – 1967) kaj Andreo Cseh [ĉe] (1895 – 1979). Por UL en 1960 la ŝtata monfarejo Rijk Munt en Utrecht preĝis monerojn kun la nominalaj valoroj 1 Stelo, 5 Steloj kaj 10 Steloj el respektive bronzo, latuno kaj kupro-nikelo. Sur tiuj moneroj aperas la jarindiko de 1959. La eldonkvantoj estis po 10 mil. En 1965

sekvis 25-stela monero: 1000 el kupro-nikelo por la cirkulado, 5000 el arĝento por la kolektistoj. 10 ekzempleroj estis preĝitaj el oro. La arĝentaj kostis po 8 usonajn dolarojn.

Oni eldonis ankaŭ paperajn Stelokuponojn. La Steloj estis tre taŭgaj por la transpago de malgrandaj monsumoj. Ankaŭ tiujn monerojn kaj kuponojn oni diligente kolektis.

Unue la valoro de la Stelo estis ligitaj al la prezo de unu kilogramo da pano, kiu kostis tiam 0,25 nederlandajn guldenojn. Poste oni plivalorigis la Stelon al 0,50 guldenoj. Fine la kurzo elkalkuliĝis per komplika formulo el la kurzoj de diversaj valutoj. Oni volis, ke la Stelo ne estu viktimo de la inflacio.

En la jaro 1993 Universala Ligo malfondiĝis. La restantaj monerojn UEA, FEL kaj IEI iom post iom vendis kiel memorajojn. La aktualaj prezoj estas inter 10 kaj 120 €.

Ĉirkaŭ 2012 oni preĝis plastajn Stelo-monerojn kun la nominalaj valoroj 1, 3 kaj 10 Steloj. Ili uziĝis en la gufuj de Internaciaj Junularaj Kongresoj. Ekzistas fejsbuka grupo "Stelaro", kiu elkalkulas la Stelo-kurzon, en novembro 2014: 1 € = 4,189 Steloj.

En 2012 Albert Boon en Belgio fondis la Esperanto-Numismatikan Asocion (ENA), pri kiu troviĝas informoj en la Jarlibro de UEA. La membreco kaj la retgazeto "Esperanta Numismatiko", kiu aperas kvarfoje en la jaro, estas senkostaj. Por membriĝi sufiĉas simpla retletero al bert.boon@skynet.be. Poste oni ricevas rete ĉiujn jam aperintajn numerojn de tiu gazeto, en kiu troviĝas multaj informoj, kiujn oni ne povas ricevi aŭ malfacile ricevas el aliaj fontoj. Tiu kreskanta faka asocio havas preskaŭ cent membrojn.

Okaze de la 150a naskiĝdatreveno de René de Saussure (1868 – 1943) aperos en 2018 la unua Stelo-monero el pura arĝento 999/1000. La nominalaj valoroj estos 100 Steloj, la maso unu unco, do 31,1 gramoj. Laŭ la arĝento-prezo (februaro 2017) 1 € = 5 Steloj.

Eventuale eldoniĝos pliaj nominalaj valoroj.



STELO-TABELO 2017

Nominalaj valoroj	Materialo; Maso de la monero; Diametro	Eldonjaro; Eldonkvanto	Plenvalora aŭ fidata monero	Valoro de la Ag en la monero laŭ la aktuala kurzo
1 Stelo	Bronzo; 3,4 g; 20 mm	1959; 10 000	Fidata	-
5 Steloj	Latuno; 5,0 g; 23,3 mm	1959; 10 000	Fidata	-
10 Steloj	Cu - Ni; 9,0 g; 28 mm	1959; 10 000	Fidata	-
25 Steloj	Cu-Ni 75-25; 19 g; 37,8 mm	1965; 1000	Fidata	-
25 Steloj	Ag 0,900; 25 g; 37,8 mm	1965; 5000	Fidata	12,28 € 22,5 g da Ag
25 Steloj	Au 0,983; 50 g; 37,8 mm	1965; 10	-	-
1 Stelo; 3 Steloj; 10 Steloj	Plasto; ?; ?	2012; ?	Fidata	-
100 Steloj (projekto)	Ag 0,999; 31,1 g (1 unco); 37 mm	2018?; 1000?	Plenvalora, se la Stelo estos ligita al la Ag-kurzo	16,98 €
50 Steloj (projekto)	Ag 0,999; 15,6 g (½ unco); ?	2018?; 1000?	Plenvalora, se la Stelo estos ligita al la Ag-kurzo	8,49 €
1 Stelo; 5 Steloj; 10 Steloj (Projektoj)	Cu	2019?; 1000?	Fidata	-

Kurzoj*** 2017 02 16: 1 unco da Ag ... 16,98 €; 1 unco da Au ... 1 162,73 €

Ag = arĝento, Au = oro, Cu = kupro, Ni = nikelo, g = gramo.

La tri moneroj aperis nur en 1960; **Valoro de la oro en 2017 02 12: 1869,34 €; ***Sen AVI

Pliajn informojn vi povas ricevi ĉe la aŭtoro de tiu ĉi artikolo: Walter Klag, esperanto@chello.at

Ligoj: https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperantismo_kaj_monero; <https://facebook.com/plastamono>; Pri ENA: <http://kolektado.esperanto.cc/ena>

Literaturo: Lawrence Mee: *La Stelo*. ISSN 0941-9306. 2003.

Hans Jankowski: *Esperantomono*. Ilustrita historio pri universala monsystemo. Germanio: Libera Esperanto-Asocio. 1994.

Neforgesebla, fruktodona kaj internacia Komuna staĝo de koreaj kaj tajvanaj esperantistoj

■ Reza Kheirkhah

Laŭ la propono de la korea grupo LLG, kiu de jaroj iniciatas komunajn staĝojn ekster kaj en Koreio, okazis kvar-taga staĝo en la urbo Pingtung en la sudo de Tajvano. Partoprenis 9 koreaj, 2 francaj kaj po 1 aŭstralia, kanada kaj irana esperantistoj, plus 19 tajvanaj esperantistoj kaj neesperantistoj, kiuj agadis de la 8-a ĝis la 13-a de februaro.

Ni okazigis diversajn programerojn instruajn, kulturajn kaj amuzajn, inkluzive prelegojn pri la ĉi-jara UK en Koreio, la ĉina novjaro, manĝo-etiketo de Koreio kaj Tajvano kaj cetere okazis kulturaj programeroj. Unu el tiuj eroj estis instruado de la korea, ĉina kaj tajvana lingvoj. Oni komparis tiujn lingvojn ankaŭ kun Esperanto. Alia vigliga programero estis instruado pri jogo de Yvonne Chen.

Kantado de tri-lingvaj kantoj tre amuzis la partoprenantojn. Esperantaj kartludoj multe helpis la komencantojn kaj eĉ progresantojn lerni kaj praktiki multajn vortojn.

Ne mankis ekskursoj: al la urbo Kaohsiung, la due plej granda urbo en Tajvano; al aborigena vilaĝo sur la monto Sandiman, kie oni spertis ĝiajn kantojn, dancojn kaj vivstilon kaj ankaŭ gustumis ĝian lokan manĝon, faris kolringojn el koloraj ŝtonoj.

Unu el la plej popularaj programeroj estis tinkturado: kolorigo de grandaj tukoj kun posta fiksado de la koloroj en bolanta akvo.

Unu vesperon en la hejmo de esperantisto pli ol 20 homoj kuiris koree kaj tajvane.

La programeroj okazis ĉefe ĉe la loka Komunuma Universitato, ĉe kiu dum 5 jaroj ni havas Esperanto-kurson.

La neforgeseblaj tagoj rapide pasis, sed restis profunda amikeco inter koreaj kaj tajvanaj esperantistoj, kiuj sin preparas por la baldaŭa Seula UK. Ĉi-jare partoprenos dek kelkaj el Tajvano, kaj tio estas rekordo por la tajvana movado. Aperis luksa broŝuro pri la aranĝo kun 64 p. da diversaj informoj kaj fotoj.

Sep koreaj esperantistoj daŭrigis la vojaĝon tra la oriento ĝis la nordo de Tajvano dum 6 tagoj, akompanate de la loka esperantistino Liru Chen, kiu estis la ĉefa motoro de tiu staĝo. Grave helpis per tradukado kaj interpretado Ingrid Chuang kaj prof. Cho (Abengo). Kore-flanke Lee Hyun-mi (Esther) kaj Lee Jung-hee (Hela) estis la ĉefaj motoroj.



R E T P O Ŝ T O

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

10.01.2017 21:33

Kara Jozefo,

Unue mi volas sendi al vi kaj viaj gekaruloj afablajn bondezirojn okaze de la nova jaro. Samtempe mi tutkore dankas vin pro via nemalhavebla kunlaboro kiel provleginto kaj – espereble- kiel provlegonto en 2017.

Esperante, ke mi mem pli sukcese antaŭprovlegis la novan numeron, mi jam dankas vin pro via multe prezata provlegado.

Amike kaj samideane,

Bert Boon

12.01.2017 15:50

Kara Bert,

jen la provlegita revuo.

Se oni laboras, oni ankaŭ eraras. Ni havas kelkajn proverbojn prie, ekz. Peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro, Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras, Kiu ĉe l' vojo konstruas, tiun ĉiu instruas, Ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu, krome Ankaŭ la bona homero kelkfoje dormetas... :-)

Mi same deziras al vi kaj la viaj ĉion bonan por la jaro! Konservu vian vivigan entuziasmon, amon al la belaĵoj kaŝitaj en numismatikaĵoj por via propra kaj nia ĝojo!

Amike: Jozefo



14.01.2017 20:23

Saluton J.P. Garden,

dankon pro via rapida respondo. Ni bonvenigas vin en nia asocio kiel 59an membron. Kiel anoncite, ni nun aldone kunsendas al vi la tri jam aperintajn jarkolektojn. Je la fino de januaro vi ricevos la unuan numeron de la nova jarkolekto. Bonvolu konfirmi la ricevon de la 12 numeroj. Dankon!

Se la revuo plaĉus al vi, ni petas vin dissendi la varbilon al aliaj SAT-membroj kaj eventuale al aliaj personoj kies retadreson vi posedas.
Ni deziras al vi agrablan legadon! Via opinio kaj viaj rimarkoj estas por ni tre gravaj.

Ni ankaŭ dankas vin pro viaj afablaj bondeziroj kaj recipokas ilin por vi kaj por la SAT-amikaro.

Kun samideanaj kaj numismataj salutoj,
Bert Boon



21.01.201718:02

Tre estimata Samideano Janot,

vian retadreson mi trovis en la Jarlibro de UEA kaj mi petas vin, se eble, helpi min trovi informojn.

En 1987 la Franca Monerofarejo en via urbo emisiis du belegajn esperantajn medalojn kun portreto de Zamenhof, respektive kiel memorigaĵon okaze de la centjariĝo de Esperanto, aliflanke de la tiama UK en Varsovio.

Por kompletigi artikolon por la revuo “Esperanta Numismatiko” mi bezonas informon pri la **eldonkvanto** de ambaŭ medaloj, laŭdire troveblaj en la jarlibro 1987 de la Monerofarejo.

Mi esperas, ke vi povus helpi min, aŭ per la informo aŭ per la retadreso de aliulo kiu povus informi min.

Mi kore kaj anticipe dankas vin kaj vin salutas

altestime kaj samideane.

Bert Boon
UEA-FD por Belgio
Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)
Ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

21.01.201720:41

Saluton Bert,

antaŭ ol ricevi vian mesaĝonmi sciis nenion pri tiuj Zamenof-medaloj.

Espéranto-France serĉas ideojn por memori la 100-jariĝon de la morto de Zamenhof.
Ni pridiskutis tiun temon dum hodiaŭa laborgrupo kaj pridiskutos ĝin morgaŭ dum nia komitat-kunsido.

Do tiu eldono de medalo povus esti parto de la ideoj kaj mi resendus vian demandon al nia komitato.

Mi esperas ke aliaj homoj memoros pri tiu evento, aŭ ke ni kapablos trovi informojn.

Ĝis,
DJ

22.01.2017 12:51

Saluton Didier,

Dankon pro via rapida respondo. Mi tute ne miras ke vi, kiel multaj aliaj samideanoj, ne konas esperantajn numismatikaĵojn, eĉ ne la trezorojn emisiitajn en via propra lando. Tial en 2013 mi fondis prinumismatikan fakgrupon kun propra fakrevuo, eble la ununuran en la historio de Esperanto.

Nun aferkoncerne. Mi sendas al vi aldone artikolon pri la plej belaj medaloj emisiitaj en Francio okaze de esperantaj jubileo kaj jubilea UK. Kiel vi rimarkos, en la priskriboj nur mankas la eldonkvantoj kaj tiurilate mi sendis al vi mian antaŭan leteron. La artikolo aperos en la 2a numero de la 4a jarkolekto de "Esperanta Numismatiko", fine de aprilo 2017.

Mi ne volas enmiksiĝi en la pridiskutoj de Espéranto-France, male, sed kiel iniciatoro de ENA mi ne povas ne instigi vin rememori la morton de Zamenhof minimume per belega honoriga medalo, kiu ĉiam konservos la aspekton kaj la imponecon de eterna juvelo (certe en arĝento!) kiu heroldos senĉese la grandajn meritojn de genia humanisto kaj iniciatoro de la plej sukcesa helpolingvo en la historio.

Amike kaj samideane,

Bert Boon



24.01.2017 20:10:04+0100

Karaj membroj de ENA,

Jen nova jaro, jen nova numero de la ENA-revuo. Denove ni deziras al vi agrablan legadon. Kiel kutime viaj rimarkoj, salutoj, ideoj ktp. estos ege bonvenaj ĉe la redakcio! Ĝis reskribo!

Amike kaj samideane,

Bert Boon

24.01.2017 23:04

Kara Bert,

Dankon pro via tre informriĉa kaj valora materialo.

Bonvole ne forgesu presigi viajn eldonaĵojn revu-forme por lokigi ilin papere en bibliotekojn.

Pluan sukceson kaj ĝojon!

Kore,

Jo Haazen

27.01.2017 20:45

Kara Jo,

Dankon pro viaj pozitivaj reagoj kaj bondeziroj.

Mi devas tamen informi vin, ke ENA estas fakgrupo sen estraro kaj do sen kasist(in)o, sekve sen mono. Por niaj membroj aliĝo kaj revuoj estas do senpagaj. Presigi niajn eldonaĵojn revuforme por bibliotekoj nur al mi mem kostus monon, evidente. Tamen laŭ propra volo kaj decido ĉiu unuopa membro aŭ asocio (bibliotekoj, muzeoj kaj aliaj, ekz. Medicinistoj-por-Esperanto) rajtas elŝuti kaj diskonigi mem la revuojn de ENA.

Danke kaj kore,

Bert Boon

27.01.2017 21:36

Kara Bert,

Komprenante la situacion mi tamen opinias ke via revueto meritas lokon en la plej gravaj Esperanto-bibliotekoj. Se ne oni riskas perdi la elektronajn versiojn de la kompletakolekto. Jen malavantaĝo de elektrona arkivado pri kiu la ĝenerala direktoro de la Ŝtata Esperanto-Biblioteko en Vienojam plurfoje avertis.

Do, malgraŭ la avantaĝoj de la moderna vivo ni nepre gardu niajn arkivojn elektrone KAJmaterie (papere).

Mi esperas ke vi trovos helpantojn kiu povus kopii viajn valorajn eldonaĵojn por ke ili estu transdonotaj al la plej gravaj E-o-bibliotekoj en la mondo, almenaŭ en Eŭropo.

Bonvole petu helpon ĉe niaj fakuloj en Kortrijk, Rotterdam, Antwerpen k.a.

Por helpi vin mi sendis al ili tiun ĉi korespondaĵon kaj atendas pozitivajn reagojn.

Gratulojn kaj kuraĝon!

Jo Haazen~

<http://johaazen.weebly.com/esperanto.html>

29.01.2017 12:26

Kara amiko Jo,

Via letero vere estas kuraĝigo por nia freŝa fakgrupo. Dankon! Krome pro via dissendo de nia konversacio al diversaj fakuloj en Kortrijk, Roterdamo, Antverpeno k.a.

Preskaŭ 16 bibliotekoj kaj muzeoj esperantaj jam perrete ricevis ĉiujn aperintajn jarkolektojn kaj ĉiuj novaj abonantoj ankaŭ tuj ricevis ĉiujn malnovajn numerojn. Tamen, kiel vi sugestas, bibliotekoj prefere ankaŭ al vizitantoj povu montri paperan version. Tio tamen sendube dependus de ilia propra decido, buĝeto ktp.

Ĉu eble ankaŭ rusaj esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj emus senpage aboni?

Mi pacience atendos pozitivajn reagojn. Se al vi mem mankus numeroj de “Esperanta Numismatiko”, simple petu al ni.

Amike,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25/01/2017 17:42

Dankon pro la sendo.

Ja kompreneble mi gustumos ĝin kiam estos iom da tempo ĉe mi!

Sincere via Elda

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

25.01.2017 7:30

Al Sinjoro: Bert Boon

en Belgio

ESTIMATA SAM-IDEANO:

La prezidantino de la Rumana Esperanto-Asocio sendis al mi informon pri la Esperanto-Numismatika Asocio (ENA) kaj ĝia organo „Esperanta Numismatiko”, kiun Vi mem redaktis. Mi estas muzeografo kaj de temp’ al tempo mi interesiĝis pri la historio de la esperantista movado (ĝis nun precipe en Rumanio).

Dezirante plenan sukceson en Via agado salutis Vin

D. Neagu
faka delegito de U.E.A. pri historio

30.01.2017 12:42

Estimata kolego - delegito Doru,

Saluton!

Mi kore dankas vin pro via afabla letero kaj pro viaj bondeziroj koncerne nian asocion ENA.

Tamen - kvankam en via subjekto estas la vorto "peto" -, ne estas tute klare ĉu vi jes aŭ ne volas senpage membriĝi kaj aboni nian revuon.

Se vi konus bibliotekon aŭ muzeon kiu emus aboni, aŭ eble unuopaj personoj, bonvolu sciigi al mi ilian nomon kaj retadreson.

Aldone vi jam ricevos la novan numeron. Sekvos la tri unuaj jarkolektoj post via eventuala aliĝo.

Mi anticipu dankas kaj salutas vin,

samideane kaj numismate.

Bert Boon
Iniciatoro de ENA

02.02.20178:57

Al Sinjoro Bert BOON

Iniciatinto de Esperanta Numismatika Asocio

KARA SAM-IDEANO:

Min interesis aboni sen-page al Via bulteno kaj ankaŭ kun-labori pri la historio de l'esperantista movado precipe mia-lande.

Mi legis artikolon Vian en la reto pri ne-konata letero de Zamenhof kaj tre plaĉis al mi Via maniero prezenti la faktojn. Do, mi esperas povi kun-labori ankaŭ science.

Plenan sukceson en Via agado!

D. Neagu

02.02.201711:58

Kara samideano,

Dankon pro via respondo. Mi ŝatas ke vi legis mian artikolon kaj ke ĝi plaĉas al vi. Mi tre volonte volas science kunlabori kun vi koncerne la historion de Esperanto kaj aliaj aspektoj.

Estu por ENA interese scii ĉu en via lando jam aperis medaloj kaj ĉu esperantaj muzeoj en Rumanio emus aboni nian revuon.

Kun amikaj salutoj,

Bert



04.02.201712:01

Kara Sinjorino Manero,

Ni kore dankas vin pro via kunlaboro.

Nuntempe ni sendas nian revuon dise en la mondo al 16 bibliotekoj. Aktuala agadero estas nun peti al tiuj organizaĵoj sendi al ni listeton de esperantaj numismatikaĵoj kiujn ili surloke posedas kaj iam akiros. Antaŭdankon pro via respondo.

Amike kaj numismate,

Bert

06.02.201720:22

Kara Bert,

Nia biblioteko ne vere konservas numismatikan materialon. Nur ĉi-tio rilatas la temon:
<http://esperanto.es:8080/jspui/handle/11013/4369>

Amike,

Ana Manero
Biblioteko Juan Régulo Pérez
www.esperanto.es/biblioteko
biblioteko@esperanto.es

07.02.201715:27

Kara Ana,

Tiuj tri medaloj estas tre interesaj kaj gravaj por la (numismatika) historio de nia internacia lingvo! Dankon pro via mencio!

Tamen, por povi akurate priskribi kaj montri ilin al la esperantistaro, ENA bezonus iam (tute ne urĝas kiam!) kolorajn skanojn kaj jenajn informojn: diametron, pezon, metalon aŭ alojon, dikon kaj eventuale surskribo(j)n sur la randoj. Mi sincere konscias, ke nia peto estus por vi penado kaj tial ni anticipe kore dankas vin!

Kun amikaj kaj numismataj salutoj.

Bert Boon (ENA)

07.02.201719:09

Mi klopodos plenumi vian peton sed ne povas diri kiam ĉar nun mi dronas en laboro. Se post prudenta tempo (kvar aŭ kvin monatoj) mi ankoraŭ ne sendis al vi la petitajn datenojn, bv. memoriĝi tion al mi.

Amike,

Ana Manero
Biblioteko Juan Régulo Pérez
www.esperanto.es/biblioteko
biblioteko@esperanto.es

08.02.2017:44

Mi tutkore dankas vin, kara Ana. Se vi konsentas, kion mi supozas, mi memorigos vin je la fino de junio, se mi dume ne jam estus ricevinta vivsignon de vi. Mi vere ĝojas pri via kunlaboremo. Se iam mi povus helpi vin iel ajn, ne hezitu peti min!

Amike,

Bert



07.02.2017 22:44

Saluton!

Mi vidis vian retadreson en la jarlibro de UEA.

Mi havas ideon: Eldoni 100-stelan moneron el pura arĝento, unu unco = 31 gramoj. Kio estas via opinio?

Jen io pri la historio de la Esperanto-mono:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Esperantismo_kaj_mono

Kio estas via opinio?

Ĉion bonan!

Walter Klag, delegito por Aŭstrio

Mi kunsendas artikolon pri la romiaj moneroj.

08.02.2017:05

Saluton S-ro Klage,

Mi dankas vin pro via tre interesa mesaĝo. La ideo eldoni 100-stelan” moneron” en arĝento (mi preferas la terminon “pagomedalo”, certe por la spesmilaj kaj stelaj pagiloj de la pasinteco, ĉar ili estas en medalofrapo) estas tre alloga, sed kiel organizi tian projekton? Dankon, ankaŭ pro la interesaj kunsenditaj tekstoj. Ĉu vi ŝatus ricevi numeron de “Esperanta Numismatiko”, la revuo de ENA?

Amike kaj numismate,

Bert Boon

Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio

08.02.2017 17:49

Saluton, s-ro Boon!

Dankon pro via letero.

Vi pravas: Ne temas pri „vera“ monero, sed medalo. Teorie oni povus pagi per arĝenta medalo, ĉar ĝi havas la valoron de la arĝento.

Salutas Walter Klag, delegito por Aŭstrio

09.02.2017 17:49

Kara Bert Boon!

En https://en.wikipedia.org/wiki/Ren%C3%A9_de_Saussure mi legis

Do en 2018 estos lia 150a naskiĝdatreveno kaj ankaŭ la 75a datreveno de lia morto.

Ĉu vi konas iajn planojn “festi” tion? Eblecoj estus ekzemple:

Ekspozicio; eldono de libro; eldono de „monero“ (ekzemple 100 steloj).

Aktuale mi kompilas tekstojn pri Spesmilo kaj Stelo. Fotojn de René mi trovis nur tiun malbonan en Vikipedio. Ĉu ekzistas pliaj fotoj de li?

Salutas Walter Klag, Vieno, Aŭstrio

10.02.2017 17:58

Kara Bert!

- 1) Elkoran dankegon pro la unuaj 13 numeroj de Via gazeto. Mi ĉion printis kaj storis sur KD.

Ĉar mi estas entuziasma kolektanto de moneroj, la temo ege interesas min kaj mi havas nun ĝojigan kaj interesan literaturon.

- 2) Dankon ankaŭ pri via numismatika terminaro. Pasintan jaron ankaŭ mi komencis tian, sed la via estas multe pli ampleksa kaj mi ne devas labori paralele.
- 3) En n-ro 2 de la jarkolekto 2 vi menciis la monumenton de Bertha von Suttner en la korto de la domo, kie estas ankaŭ la Pacmuzeo (Blutgasse, Vieno). Pasintan jaron oni fortransportis la monumenton, mi ne scias kien.
- 4) Ĉu mi rajtas ion proponi? Ĉu eblas sube sur la paĝoj ne nur skribi la numeron de la paĝo, sed ankaŭ la numeron de la gazeto?

Denove dankas

Walter Klag

10.02.2017 20:41

Kara Walter,

Mi ege ĝojas, ke vi ankaŭ estas prinumismatika samideano! Mi supozas, ke vi posedas trezoron de numismatikaĵoj kaj informoj kiuj povus esti tre gravaj kaj taŭgaj por nia fakgrupo kaj kiuj meritas lokon en nia revuo. Mi jam avide atendas eblecojn kunlabori kun vi!

La terminaro estas problema aspekto. Ĝi kreskas hazarde kaj ne laŭsisteme. Tiajn vortojn oni certe grandparte povas trovi en PIV kaj aliaj vortaroj sed kostus tro da tempo tralegi la kompletan vortaron, ĉu ne? Por la kompilintoj probable eblus diĝite elkribri kion ni bezonas, sed mi ne scias kiel.

Vi ne scias KIEN oni fortransportis la monumenton de Bertha von Suttner, ĉu?. Mi eĉ demandas min KIAL! Ĉu politika decido? Ĉu decido de prikulturaj barbaroj?

Kompreneble vi rajtas proponi ĉion kion vi konsideras avantaĝa por ENA. Via propono estas sendube tre taŭga kaj mi proponas ekuzi ĝin ekde la unua numero de la venonta jarkolekto...

Alia interesa temo pri kiu vi parolis. Por memori la gravegan rolon de René de Saussure, eldono de memormedalo en arĝento estus minimuma farenadaĵo. Tamen kial “100 steloj”? Mi preferus “10 spesmiloj” (**laŭ deziro ne plenumita de de Saussure mem, tamen en oro!**). Vi certe scias, ke ekzistis ne nur pagomedaloj de 1 spesmilo kaj 2 spesmilo(j) sed ankaŭ 1 ora medalo de 50 spesmiloj, donacita en 1913 dum la UK en Krakovo al d-ro Zamenhof! *Vidu ankaŭ: jarkolekto 2 num.1, p.5 & 6!*

Unu demando nur. Ĉu via bonega ideo pri tia medalo en 2018 povus esti realigita kaj kiel? Kompreneble ENA povus kunlabori per anonco, mendilo, propagando dum la UK en Lisbono (kiam mi tre probable ĉeestos)...ktp.

Kun amika kaj numismata salutoj,

Bert

10.02.201723:11

Kara Bert!

Dankon pro via letero.

Vidu supre: Mi trovis ĉe ebay 1 Stelo-premiokuponon.

Salutas Walter

12.02.201716:18

Kara Bert!

Dankon pro via letero.

Ĉu vi konas la vizaĝlibran paĝon <https://www.facebook.com/plastamono/> pri la plastaj steloj?

La aktuala kurzo laŭ “stelaro“ estas

1 stelo = 0,2387 €.

<Mi preferus “10 spesmiloj” (**laŭ deziro ne plenumita de de Saussure mem, tamen en oro!**).

<Vi certe scias, ke ekzistis ne nur pagomedaloj de 1 spesmilo kaj 2 spesmilo(j)

< sed ankaŭ 1 ora medalo de 50 spesmiloj,

<donacita en 1913 dum la UK en Krakovo al D-ro Zamenhof!

<Vidu ankaŭ: *jarkolekto 2 num.1, p.5 & 6!*

Mi legis tion!

Tre bona ideo, eldoni orajn spesmilojn. Ĉu vi volas realigi tion?

Mi planas eldoni 100-stelan arĝentan moneron (=pagomedalon).

Materialo: Pura arĝento 999/1000, maso = unu unco = 31,1 g.

Laŭ la nuna valoro de la arĝento la kurzo estus

1 stelo = 0,1688 €.

Kiu sukcesos unue?

Salutas Walter

12.02.2017 17:56

Kara Walter,

Dankon pro via interesa mesaĝo. Ankaŭ pro la informo pri la premiokupono!

Ne, mi ne sciis, ke ankaŭ ekzistas plastaj steloj. Mi tuj rigardis kaj notis la fonton por iam uzi ĝin en la rubriko” Spikumajoj kaj suplementoj”. Dankon!

Nur mia vidpunkto kompreneble pri tio “10 spesmiloj”! Evidente vi tute sendepende decidis se vi kreigos memoran medalon, pri kio mia numismata koro jam ege ĝojas! Mi mem tute ne planas eldoni oran aŭ alian medalon, do konkuranton en mi vi certe ne havos, male...

Krome, mi deziras al vi grandan sukceson koncerne vian rekomendindan projekton. Mi eĉ jam dezirus mendi minimume unun ekzempleron, depende de la prezo eble du!

Kun amikaj salutoj,

Bert

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

10.02.2017 21:43

Kara Bert,

mi kore dankas pro via alsendo, mi bonorde ricevis kvar retmesaĝojn viajn kun aldonaĵoj.

Jes, mi loĝas en Austrio kaj Walter Klag estas longhara, longjara konatulo de mi.

Li indikis al mi la ekziston de ENA.

Mi aliĝis, kvankam mi kutime ne kolektas monerojn. Mi ĝojas pri via Esperantlingva aktiveco en tiu fako.

Mi plurekomendos vian asocion al aliaj Esperantistoj, se vi konsentas.

Kun fortaj deziroj pri plua sukceso,
Alfred

12.02.2017 18:02

Kara Alfred,

Dankon pro la kromaj informoj pri via persono!

Al ni evidente plaĉos se vi akceptus plurekomendi nian asocion. Ni kore antaŭdankas vin kaj ankaŭ pro viaj bondeziroj rilate al ENA.

Amike kaj numismate,

Bert



15.02.2017 18:46

Dear Mr. Boon,

we are interested in your journal Esperanto Numismatiko.

Do there also exist printed copies?

I found your journal in the internet in pdf versions.

Best regards
Hubert Emmerig

--

ao. Univ.-Prof. Dr. Hubert Emmerig M. A.

Universität Wien – Historisch-Kulturwissenschaftliche Fakultät Institut für Numismatik und Geldgeschichte Franz Klein-Gasse 1 A-1190 Wien, Österreich / Austria

16.02.2017 10:20

Sehr geehrter Herr Professor,

Wir danken Ihnen für Ihr Interesse. Von Anfang an war unser Ziel unsere Mitglieder als vollwertige, potentielle und mitbestimmende Mitarbeiter zu betrachten. Nicht ohne Erfolg! (Sehen Sie die Korrespondenz in der Rubrik "Retposto".) Das ist der Grund dafür, dass Mitgliedschaft und Zeitschrift kostenlos sind. Unser Verein hat keine Kasse. Deswegen kann man die Zeitschrift nur über das Internet bekommen.

Andererseits ist jeder frei die Art und Weise selbst zu bestimmen, wie er das Angebotene aufbewahren will, teilweise oder integral, usw.

Wenn Sie das wünschen, können Sie sehr bald alle schon erschienenen Nummern bekommen und auch alle neuen ab Ende April 2017.

Hochachtungsvoll,

Mag.Fil.Bert Boon
Iniciatoro de "Esperanto-Numismatika Asocio"

16.02.2017 20:22

Sehr geehrter Herr Boon,

vielen Dank für Ihre Antwort.

Die homepage, auf der es die bisherigen Hefte gibt, habe ich gefunden.
<http://esperanto.es:8080/jspui/handle/11013/5227>

Über Nachricht bzw. Zusendung, wenn es eine neue Ausgabe gibt, wäre ich dankbar.

Danke und beste Grüße
Hubert Emmerig

16.02.2017 21:23

Sehr geehrter Herr Professor Emmerig,

Herzlichen Dank für Ihr weiteres Interesse. In unserer internationalen Liste von Vereinen usw. die regelmässig die neuen Hefte bekommen (aktuell 16, unter denen vor allem Bibliothek und Museen) wird das Institut für Numismatik und Geldgeschichte Ihrer Fakultät als 17tes Mitglied registriert. ENA heisst Sie und Ihre Mitarbeiter herzlich willkommen und hofft auf eine gute Zusammenarbeit. Dies wäre für ENA eine grosse Ehre!

Hochachtungsvoll,

Bert Boon

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

26.02.2017 15:35

Kara

Mi planas aperigi informon pri via asocio per tuta paĝo. Ĉu vi povas helpi min provlegi la tekston? Mankas al mi provlegantoj.

Ĉu mi rajtas aperigi la bildojn el via revuo?

kore

Trezoro Huang Yinbao
Redakcio de *Tra la mondo*
Esperanto-Centro Ora Ponto
Chinio

26.02.2017 20:52

Kara sinjoro Huang Yinbao,

Mi tre dankas vin pro via afabla letero. Mi evidente konsentas, ke vi uzos bildojn el la revuo. Mi devas tamen atentigi vin ke unu moneron vi montras dufoje. Estas la monero kun valoro 1 spesmilo.

Aldone mi sendas al vi bildon de monero de 2 Sm kaj de 10 steloj. Vi povas mem elekti kion vi volas publikigi.

Mi provlegis la tekston por via revuo kaj jen kion mi rekomendas.

- 58 individuaj membroj; nun en februaro 2017 estas 65 individuaj membroj
- 16 organizaĵoj ...; nun estas 17 organizaĵoj
- Alia eraro: lasta vorto ne estas nomismatiko, sed numismatiko

Mi ege dankas vin ke vi volas publikigi la artikolon en via revuo. Krome mi deziras al vi multan sukceson.

Ĝis reskribo.

Amike kaj numismate salutas vin

Bert Boon

27.02.2017 4:32

Kara Bert

Dankon pro la provlego kaj la valora atentigo. Mi jam korektis ilin.

Ankaŭ mi kaj Esperanto-Centro Ora Ponto petas aliĝi al via asocio.

Laŭ via priskribo, mi ĝisdatigis la kvanton de la individuaj membroj kaj organizaj membroj ĝis 66 kaj 18, ĉu vi konsentas?

Mi preferas aperigi ankaŭ vian foton apud la teksto, bv. sendi vian foton al mi, se vi konsentus.

kore

Trezoro

Direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto

01.03.2017 20:09

Kara Huang Yinbao,

Ne dankinde pro la provlego.

Ni bonvenigas vin kiel 66an membron de ENA, kaj la asocio E-C Ora Ponto kiel 18an asocian membron. Post vi aliĝis ankaŭ 67a membro.

Aldone mi sendas al vi unu el miaj fotoj kaj la unuan numeron de la 4a jarkolekto. Poste vi ricevos ankoraŭ la tri jam aperintajn jarkolektojn (12 numerojn). Bonvolu konfirmi la ricevon de la tuto.

Dankon pro via aliĝo kaj agrablan legadon.

Kroman demandon: ĉu en Ĉinio jam aperis esperantaj medaloj?

Numismate kaj amike,

Bert Boon



08.04.2017 18:39

Kara samideano,

mi ĵus legis tre interesan artikolon en la gazeto Esperanto pri steloj kaj mi petas vin sendadi al mi la revuon Esperanta Numismatiko. Mi kolektas nur arĝentajn monerojn kaj mi jam gojas al la jaro 2018, kiam oni povos aĉeti la plen valoran unu uncan moneron en la valoro de 100 steloj. Dankon.

Sincere,

Petr Deák, Ĉeĥa Respubliko

08.04.2017 19:54:10

Kara sinjoro Deák,

Ni bonvenigas vin kiel 77an membron de ENA.

Aldone mi sendas al vi la unuan numeron de la 4a jarkolekto. Sekve vi ricevos ankoraŭ la tri jam aperintajn jarkolektojn (12 numerojn). Bonvolu konfirmi la ricevon de la tuto.

Dankon pro via aliĝo kaj agrablan legadon. Viaj reagoj, komentoj kaj aldonoj estas ege bonvenaj!

Vi estas la unua samideano kiu aliĝas, leginte la artikolon de Walter Klag. Mi ĝojas, ke vi mem ankaŭ kolektas kaj kune kun vi mi ĝojas pri la arĝenta monero de 100 steloj.

Numismate kaj amike,

Bert Boon

08.04.2017 20:37

Kara samideano,
koran dankon pro la enhavoriĉa bulteno Esperanta Numismatiko. Mi bonorde ricevis ĉiujn numerojn. Tre interesa legado.

Sincere via,
Petr Deák

☆☆☆☆☆☆☆☆

08.04.2017 18:39 GMT+02:00

Mag. Walter Klag :



Hoofdstuk 1 Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Retadreso: info@uea.org

Delegita formularo

Mag. Walter Klag, UEA-kodo: klag

sinproponas kiel:

— fakdelegito

Notoj: Fakdelegito por numismatiko; Mia profesio: Eldonisto, ĵurnalisto, bienomastro

Kara Walter,

Elkoran dankon pro via mesaĝo. Laŭ ĝi mi ŝanĝis vian priskribon, kaj ne plu estas noto inter viaj fakoj pri fiziko, nur pri numismatiko.

Belan sabatvesperon al vi!

Kore,

Veronika Poór

Ĝenerala Direktoro

09.04.2017 16:26

<Mi tre ŝatus scii kion signifas "fidata" (revuo "esperanto" tabelo de paĝo 93)>

<Mi antaŭdankas pro la respondo.>

<Kore salutas J-P Boulet, delegito de UEA en Cournon d'Auvergne, reprezentanto de ILEI por Unesko>

Altestimata s-ro Boulet!

Dankon pro via demando.

Ekzemple 1800 en Aŭstrio ni havis orajn kaj arĝentajn monerojn, kies metala valoro estis la sama kiel la nominalo minus la pregokostoj.

Temas pri “plenvvaloraj moneroj”.

<https://de.wikipedia.org/wiki/Kurantm%C3%BCnze>

https://en.wikipedia.org/wiki/Currency_money

Por pagi malgrandajn sumojn ni havis ankaŭ monerojn el kupro kaj poste el aliaj ne-alt-valoraj metaloj. La metalvaloro de la monero estis malpli ol la nominalo. Sed oni “fidis”, ke oni povus ŝanĝi tiujn monerojn al oraj kaj arĝentaj. Temas pri “fidataj” moneroj.

Angle fiat money, germane Fiatgeld aŭ Scheidemünzen.

France: https://fr.wikipedia.org/wiki/Monnaie_fiduciaire

La aktualaj €-moneroj de unu Cendo ĝis 2 Eŭroj estas fidata-mono.

Se vi havus pliajn demandojn, ne hezitu skribi al mi! Volonte mi diskutas pri numismatikaj demandoj.

Salutas Walter Klag, Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio.

UEA-fakdelegito por numismatiko.

A N O N C O J

&

E V E N T O J

La Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Havaĵoj kaj projektoj(1)

Bernhard Truider



Palais Mollard, Wien, Herrengasse 9

En 2016 rekorda nombro de 15.937 personoj vizitis la Esperantomuzeon en Vieno. Kompare kun la jaro 2015 (13.396) tio estas rimarkinda 18,97-elcenta kresko. Se oni konsideras, ke la Esperantomuzeo nur disponas pri spaco de 80m², la statistiko estas elstara: ekde 2005, kiam la nova ekspozicio en Herrengasse 9 estis inaŭgurita, vizitis pli ol 110.000 personoj la Esperantomuzeon, okazis pli ol 700 gvidadoj kaj pli ol 350 Esperanto-fulmkursoj (regule nur ekde la jaro 2009), kiujn partoprenis entute pli ol 7.000 personoj.

1. Havaĵo

Ekde sia fondo en 1927 la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko disponas pri biblioteko, kiu ekde 1990 oficiale nomiĝas “Kolekto por Planlingvoj”. En sia 90-jara ekzisto la biblioteko daŭre pliampleksiĝis kaj estas hodiaŭ la plej granda kolekto de planlingvoj kaj interlingvistiko kaj la plej granda Esperanto-biblioteko en la mondo. Laŭ dokumentspecoj ĝi konservas ĉirkaŭ 40.000 faldfoliojn, 35.000 volumojn, 25.000 gazetartikolojn, 22.000 fotografiaĵojn, 10.000 aŭtografojn kaj manuskriptojn, 3.500 diversajn titolojn de gazetoj kaj revuoj, 3.000 muzeajn objektojn, 1.500 afiŝojn kaj 1.200 sondokumentojn. En tiu kunteksto ankaŭ menciendas, ke ne estas kalkulitaj duoblaĵoj, tial la realaj nombroj estas efektive pli grandaj ol la menciitaj.

Kiel parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko la Kolekto por Planlingvoj plenumas ĉiajn taskojn kaj postulojn de moderna biblioteko. La konkretaj celoj estas:

- kompletigi la havaĵon per daŭra kolektado
- konservi kaj protekti la planlingvan materialon
- katalogi la tutan havaĵon
- disponigi la kolekton al la publiko
- respondi demandojn, skribe kaj buŝe
- esplori kaj publikigi dokumentojn kaj objektojn

2. Projektoj

2.1 La biblioteka katalogo Trovanto

1996 en la Kolekto por Planlingvoj komenciĝis la elektronika katalogado de libroj, gazetoj kaj revuoj, en 2005 la retrospektiva katalogado finiĝis, kaj samtempe ankaŭ realiĝis la datumigrado en novan biblioteksistemon.

Tiel oni povas jam ekde pli ol 20 jaroj tute sendepende de loko kaj horo traserĉi la havaĵon per la katalogo “Trovanto”, kiu estas parto de la ĝenerala katalogo – la tiel nomata “Quicksearch” – de la Aŭstria Nacia Biblioteko. “Trovanto” estas alirebla per la retejo de la Kolekto por Planlingvoj, kiu estas legebla ne nur en la germana kaj la angla, sed ankaŭ en Esperanto.



La katalogeroj en “Trovanto” ricevas kapvortojn en la germana kaj en Esperanto, tial ambaŭ lingvoj estas uzablaj por reserĉado. Pro la integrado de la bildkatalogo – “Bildarchiv Austria” – en Quicksearch oni povas ekde 2013 traserĉi per “Trovanto” ĉiujn katalogitajn materialojn – pli ol 54.000

katalogerojn – de la Kolekto: librojn, periodaĵojn, kompaktajn diskojn, DVD-ojn, sonbendojn, bilddokumentojn (fotojn, bildpoŝtkartojn, glumarkojn, muzeajn objektojn, afiŝojn) kaj arkivaĵojn¹.

La katalogeroj de la bilddokumentoj enhavas kaj skriban informon kaj bildeton de la koncernanta objekto. Krome la datenaro de pli ol 800 libroj² kaj 70 diversaj periodaĵoj³ havas rektan ligilon al la diĝita verko, por ke bibliotekuzantoj povu tute libere kaj senpage foliumi kaj legi ilin ĉe ĉiu ret-aliro, ankaŭ ekstere de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

Tiu servo ankaŭ montras, kiel la esplorebloj kaj uzebloj ŝanĝiĝis dum la pasintaj 25 jaroj. En 1990 leganto devis – ankoraŭ per relative granda elspezo de tempo – iri al la biblioteko, traserĉi la katalogon de slipoj, mendi la presaĵojn surloke kaj atendi ĝis kiam li povis legi ilin en la legsalono, sed nuntempe reserĉado kaj mendado eblas komforte per la interreto.

Pro la daŭre kreskanta nombro de ciferecigitaj verkoj ofte eĉ ne necesas iri surloken en la bibliotekon por ricevi la deziritajn informojn, ĉar jam multaj diĝitaj verkoj estas rigardeblaj per la katalogo “Trovanto”.

Alia granda avantaĝo de ciferecigado estas la malfermaj horoj de la virtuala legsalono, kiu estas – alirebla per la retejo de la Aŭstria Nacia Biblioteko – malfermita 24 horojn je unu tago, je 7 tagoj dum la semajno kaj kiu iĝas daŭre pli ampleksa pro la regula aldonado de novaj diĝitaj dokumentoj. La apliko kaj uzo de la interreto tiel kaŭzas evidentan ŝanĝon de utiligstrategioj, relative ampleksan virtualan legsalonon kun permanentaj malfermaj horoj kaj sekve de tio instigon kaj intensivigon de sciencaj esploroj.


2.2 La bilddatumbanko – Bildarchiv Austria

Ekde la jaro 2007 granda parto de la 22.000 fotografiaĵoj de la Kolekto por Planlingvoj estas sisteme skanita kaj katalogita en la bilda katalogo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, la tiel nomata “Bildarchiv Austria”. Aldone ankaŭ realiĝis ampleksa ciferecigo kaj katalogado de bildpoŝtkartoj, glumarkoj, muzeaj objektoj kaj afiŝoj tiel, ke nuntempe troviĝas pli ol 17.000 katalogeroj en la datumbanko. El ili ĉirkaŭ 12.000 estas serĉeblaj per la interreto.

¹ Noto: Inter la arkivaĵoj, kiuj estas konservitaj en la Kolekto por Planlingvoj, troviĝas ankaŭ 55 antaŭ-kaj postlasaĵoj (marto 2017). La plej ampleksaj de ili estas jenaj de Kálmán Kalocsay (1891-1976), Eugen Wüster (1898-1977), Engelbert Pigal (1899-1978), Walter Mudrak (1904-1998), Andreas Juste (1918-1998), Jacques Bol (1922-2009) kaj Manuel de Seabra (1932*).

² Noto: La skanitaj libroj koncernas precipe la fruajn Esperanto-presitaĵojn, kiuj estis publikigitaj antaŭ 1910.

³ Noto: Entute estis ciferecigitaj ĉirkaŭ 700 jarkolektoj (komence de 2017) el la periodo inter 1889 kaj 1946.



Bilddokumentoj de la Esperantomuzeo en la “Bildarchiv Austria”

La “Bildarchiv Austria”, kiu same kiel la katalogo “Trovanto” estas alirebla per la retejo de la Kolekto por Planlingvoj, ebligas je la maldekstra flanko du serĉmanierojn, la rapidan serĉon (“Schnellsuche”) kaj la profesian serĉon (“Profisuche”), ĉe kiu oni povas entajpi vortojn en pluraj kategorikampoj. Rekomendindaj serĉvortoj – la lingvo de dokumentado en la bilda katalogo estas nur la germana – estas nomoj de personoj, landoj kaj urboj aŭ jarnumeroj kaj okazintaĵoj, ekzemple kongresoj.

Daŭrigota



Se vi hazarde aŭ akcidente forviŝis kompletan numeron de “Esperanta Numismatiko”, vi tutsimple serĉu en Google por trovi la kompletajn jarkolektojn de nia revuo.

Agu tiel: **Google**

Skribu en Google: bitoteko.esperanto.es:8080/jspui/handle/11013/7

klaku: [Bitoteko - Federación Española de Esperanto](http://bitoteko.esperanto.es)

Vi ricevos: **Bonvenon al Bitoteko!**
Jen la bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio



Ni tutkore dankas Anan Manero pro ŝia iniciato.

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu dissendi la suban tekston al plejeble multaj esperantistoj, kies retadreson vi posedas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via helpo estas bezonata! Mi anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, estis fondita en 2013 la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum nur kvar jaroj ĝis 77 individuaj membroj kaj 18 esperantaj organizaĵoj, bibliotekoj kaj muzeoj, dise en la mondo.

Agrable por vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas **SENPAGE** aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la **NUR PERRETA** revuo estas tute **SENKOSTA**! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2016 sur p. 67. Se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be!

Vi rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”